

Núm. 121 Junio 1927

ESTATUTOS

DE LA

ASOCIACIÓN ESPAÑOLA ESPERANTISTA

(HISPANA ESPERANTO-ASOCIO)

Artículo primero. *Objeto.*—H. E. A. tiene por objeto propagar y aplicar la lengua auxiliar internacional Esperanto en España, acelerar su adopción oficial y facilitar su uso por todos los medios, apartándose de cuestiones sociales, políticas y religiosas.

Art. 2.° *Miembros.*—Se consideran Miembros de H. E. A. cuantas personas acepten y cumplan estos *Estatutos*. Las categorías de Socios, aplicables en cada caso por la Directiva, serán: *a)* Numerarios; *b)* Protectores; *c)* Honorarios. A las dos últimas pueden pertenecer también Sociedades o Corporaciones. La cotización será *dos* pesetas por año; el Comité está autorizado para variarla, así como para eximir de ella a los socios Honorarios, dando cuenta de su justificación en las Asambleas, que serán las que en definitiva decidan.

Art. 3.° *Directiva.*—El Comité Director de H. E. A., elegido entre sus Miembros, estará compuesto de Presidente, Vicepresidente, Secretario y Tesorero, mas *dos Vocales* por cada región. Los cargos durarán *dos* años y serán reelegibles, siendo reemplazables entre sí las obligaciones y atribuciones de cada cargo.

Art. 4.° *Estatutos.*—Sólo mediante el voto de *dos* tercios de los socios Numerarios podrá acordarse un cambio en los *Estatutos;* igual número se precisará para decidir la disolución de la Sociedad.

Art. 5.° *Congresos.*—Se efectuará, en lo posible, un Congreso o Asamblea General anua. Sus acuerdos se notificarán a todos por el periódico o por circular, y serán válidos si en los tres meses siguientes no fueren desechados por más de la mitad de los Numerarios. En estos Congresos la Directiva dará cuenta de su actuación, y sus cuentas serán informadas por *dos* socios competentes nombrados por la Asamblea.

Art. 6.° *Gaceta.*—H. E. A. publicará sus comunicaciones y dará cuenta de su gestión en una publicación esperantista española, si es posible, órgano propio, perteneciendo en este caso el Director al Comité Director de H. E. A.

Art. 7.° *Instituto.*—Se crea en España, como órgano técnico de H. E. A., el Instituto de Esperanto, con vida autónoma y Reglamento propio.

Art. 8.° *Domicilio y fondos.*—El domicilio social de H. E. A. es el de la Cruz Roja Española, hoy Sagasta, 10, Madrid. En caso de disolución, los fondos sociales irían al Grupo Esperantista local más numeroso en España.

Madrid a 31 de mayo de 1926.

El Presidente,
CARLOS M.ª CORTEZO.

Hay un sello de H. E. A.

El Secretario,
MARIANO MOJADO.

Presentado en esta Dirección General de Seguridad.—Madrid, 10 de septiembre de 1926.—El Director General, *Pedro Bayn.*—Hay un sello de la Dirección General de Seguridad.

3.ª Epoko * N.º 121 Junio * 1927

LA SUNO HISPANA

Organo de la hispanaj esperantistoj ✶ Organo de los esperantistas españoles

Fondinto: AUGUSTO JIMENEZ LOIRA

Redaktejo: Colón, 24 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

Direktoro: M. CAPLLIURE

ESPERANTISTAS EN ZARAGOZA

El diario *Las Noticias*, de Barcelona, del 25 del pasado mes, habla de la reunión esperantista habida en la ciudad de Zaragoza y comunica que en ella se trataron los detalles de organización del Congreso que se ha de celebrar en Sevilla el año que viene. Entre otros *samideanos* españoles tomaron parte en esa reunión los conocidos campeones Sres. Maynar, abogado de la citada capital aragonesa, el doctor Bartoméu, farmacéutico de Barcelona, Máñez, de Cheste (Provincia de Valencia), Benigno de Luna, abogado, y Teodosio de la Cruz, de Madrid.

El grupo local «Frateco» acogió con entusiasmo a sus huéspedes.

El referido diario también publicó el programa de *Radio Barcelona* y anunció la conferencia que daría el Dr. Bartoméu, acerca de «La utilidad del Esperanto entre los farmacéuticos», a las 20'30 horas de la misma fecha.

Recibida la información anterior, nos escribe D. Benigno de Luna protestando de la inserta por el diario de Barcelona, *Las Noticias*, bajo el epígrafe *Los esperantistas*, por ser inexacta, toda vez que dicho periódico afirma que se habían reunido en la capital aragonesa varios esperantistas, cuyos nombres cita, para tratar de *organizar* un Congreso en Sevilla.

La protesta de nuestro comunicante la funda en que, siendo facultad de la Directiva de la H. E. A. la de organizar Congresos, y ocupándose ya dicho organismo oficial del mencionado asunto, no tenían por qué acordar los reunidos en Zaragoza nada respecto a este particular.

La verdad de lo ocurrido es lo siguiente:

ESPERANTISTAS EN ZARAGOZA

Coincidiendo con las fiestas de primavera y con la peregrinación nacional a Nuestra Señora del Pilar de Zaragoza, se han reunido en aquella capital algunos esperantistas aragoneses, catalanes, valencianos, vascongados, castellanos nuevos y castellanos viejos, a todos los que sus *samideanos* del Grupo «Frateco el Zaragozo» recibieron con gran satisfacción y espléndidamente obsequiaron con un banquete en el amplio y elegante comedor del Círculo Mercantil, Coso, 25.

En los diferentes actos que celebraron, cambiaron impresiones respecto a muchos e interesantes asuntos de actualidad, relacionados con el mundo esperantista, y muy particularmente trataron del VII Congreso Nacional Esperantista que ha de celebrarse en Sevilla en uno de los meses de Otoño del próximo venidero año 1928, después de la inauguración oficial de la Exposición Ibero-Americana, que se verificará el día 12 de octubre del mismo año, manifestando la mayoría su propósito de acudir al Congreso y todos sus fervientes deseos de que se vea coronado con el éxito más completo.

KION INTENCAS FARI U. E. A.?

En sia *Oficiala Bulteno* nº 19 (marto 1927) al la delegitoj, kiu laŭ surpreso estas *konfidencia* kaj *ne represebla!*, U. E. A. parolas pri tre grava afero. Ni okupos nin ĉi tie iom pri ĝi, malgraŭ la du avertaj surpresoj, kiujn U. E. A. mem ŝajne ne respektas sendinte la bultenon en nefermita koverto, kio ja forprenas la tutan pezon de la vorto *konfidencia*. Kaj represi oni kredeble ne bezonas ĝin, ĉar certe per la delegitoj ĝia enhavo alarmanta disvastiĝos rapide inter la tuta U. E. A.-anaro.

Minacas la komitato (aŭ la direktoro nur, kiu parolas per aroganta *ni?*), likvidi la asoción. Sed... ni demandu: ĉu ili tion rajtus? Eĉ se laŭ la statutoj ili havus tiun rajton (en la U. E. A.-regularo mi ne sukcesis trovi ĉi-koncernan paragrafon), ĉu la granda amaso de la anoj nenion havas por aldiri, neniel povas influi en tia gravega decido? La asocion ja formas la miloj da anoj, ne rondeto da komitatanoj, kaj tiuj anoj estas la lasta instanco. Estu konstatate, ke kabineta kunsido kaj decido neniam nuligos asoción, se ĝiaj membroj ne plene konsentos.

¿QUÉ INTENTA HACER U. E. A.?

En su *Boletín Oficial* núm. 19 (marzo 1927), a los delegados, con la condición de *confidencial* y *no publicable*, U. E. A. habla de un asunto muy grave. Nos ocuparemos aquí de él, a pesar de las dos advertencias aludidas, que la misma U. E. A. no respeta, remitiendo el boletín en sobre abierto, lo que desecha todo el peso de la palabra *confidencial*. Y no es necesario reimprimirlo, pues que los delegados ya se encargarán de difundir tan alarmante contenido entre todos los asociados rápidamente.

Amenaza el comité (o el director solo, que se expresa por un arrogante *nosotros*), con liquidar la asociación. Pero... preguntemos: ¿acaso ellos tendrían ese derecho? Hasta si con arreglo a los Estatutos ellos lo tuviesen (en los Estatutos no he podido encontrar ese artículo), ¿la gran masa de socios nada tiene que decir? ¿De ninguna manera puede influir en tal decisión? La asociación está formada por miles de socios, no por un círculo reducido de directivos, y esos asociados constituyen la última instancia. Hay que hacer constar que una decisión de la directiva no puede anular a una asociación si todos sus miembros no la aprueban por mayoría absoluta.

Kial do la likvido? Nu, ĉar la 10.000 (pli-malpli) membroj bezonataj de U. E. A., pli ĝuste de ĝia estraro, por subtenadi sep oficistojn, gazetojn, oficejon, entute (tro) grandan aparaton, ne tiel rapide kuniĝas kaj troviĝas, kiel dezirinde estus, eĉ male, la nombro lastjare iom malkreskis. Sed ĉu tio vere estas tiom superpendanta danĝero? Ĉu tio vere necesigas tujan bankroton? Permesite estas demandi: ĉu U. E. A. ne vivis, funkciis kaj servis kun mil membroj? poste kun tri, pli poste kun kvin mil? Ne, tia opinio de l' estraro de U. E. A. almenaŭ estas... stranga.

Se la enspezoj ne sufiĉas (ĉiujare proks. 70.000 pesetoj estas tamen beleta sumeto) por tiel grandstila agado, kian realigas U. E. A. nun, bone, oni trovu helprimedojn. Oni fiksu budĝeton nur sur tute certa nombro, da anoj. Tiu neŝanceliĝebla bloko da membroj ekzistas; se ne estas 8.000, eble 7.000, eble eĉ malpli, sed eksterdube estas, ke ekzistas tiu firma faktoro. Agorde al ĝi oni eble devos oferi tiam ion ŝpari, kie eblas ŝpari. Anstataŭ la pompa gazeto ekz. sufiĉus simpla asocia bulteno entenanta precipe la sciigojn pri ŝanĝoj inter la delegitoj, servoj, organizaj demandoj k. t. p. Eble oni devos ankaŭ maldungi oficistojn. Eniri en tiajn detalojn kompreneble ne celas ĉi-tiuj modestaj linioj.

Sed oni volas detrui la tutan konstruaĵon, malaperigi la tutan organizaĵon, la interligilon, la jarlibron, perforte forpreni de ni la eblon, praktike eluzi nian Esperanton!

Tamen sub la intenco de l' estraro kaŝiĝas evidente la deziro nur daŭrigi la gazeton, kiu donas profiton, kaj ili supozas, que je 4.000-4.500 abonantoj ili rajtus kalkuli... Ĉu jes...? Ĉu post mala-

¿Por qné la liquidación? Pues porque los 10.000 (más o menos) miembros que necesita la U. E. A., mejor diríamos su directiva, para sostener siete oficinistas, revista, oficina, en suma un (demasiado) gran aparato, no se juntan ni encuentran tan rápidamente, como fuera de desear, y porque, al contrario, en el último año disminuyeron. Pero, ¿en verdad existe tan gran peligro sobre nosotros? ¿Es que eso determina inminente bancarrota? Hay que preguntar: ¿acaso U. E. A. no ha vivido, funcionado y servido con mil miembros, después con tres mil y más tarde con cinco mil? No, esa opinión de la directiva de la U. E. A. por lo menos es... muy extraña.

Si los ingresos no bastan (anualmente unas 70.000 pesetas es, sin embargo, una bonita suma) para una acción tan grande como realiza U. E. A. actualmente, está bien, búsquense los oportunos remedios. Confecciónese un presupuesto basado solamente en un cierto número de miembros. Ese bloque constante de miembros existe; si no son 8.000, posible sean 7.000 y hasta menos, pero no hay duda de que existe factor tan importante. De acuerdo con él debería, a ser posible, acometer economías, en lo que lo permita. En lugar de la revista pomposa, por ejemplo, sería bastante un sencillo boletín de la asociación, reducido principalmente a las noticias de cambios en los delegados, servicios, cuestiones de organización, etc. Hasta podría prescindirse de algún oficinista: entrar en estos detalles naturalmente no es objeto de estas modestas líneas.

¡Pero, se quiere destruir todo el edificio, hacer desaparecer toda la organización, el lazo de unión, el anuario, por la fuerza arrebatarnos la posibilidad de implantar en la práctica nuestro Esperanto!

Sin embargo, bajo la intención de la directiva se oculta evidentemente el deseo de continuar únicamente la revista, que da provecho, y suponen que pueden contar con cuatro o cinco mil

pero de U. E. A. restos tiom da eksa-noj interesiĝantaj pri gazeto, kiu, aparte dirite, laŭ mia tutprivata opinio, en sia lingvaĵo ofte deflankiĝas sufiĉe de la pura klasika lingvoformo zamenhofa? Se la organizo malaperos, for ankaŭ la gazeton! Malgraŭ ĝiaj historio, reputacio kaj graveco, ĝia ekzistorajto tiam ĉesos. La organizaĵon kaj la jarlibron neniam ĝi povos anstataŭi.

Entute, la afero pri U. E. A. estas akuta kaj tuŝas la tutan e-istaron. Pri ĝi ja devos okupiĝi la Danziga Kongreso.

Ni esperu, ke en la jubilea jaro 1927ª por Esperanto ne okazu tia malutilo, tia skandalo, kia estus la malaperigo de U. E. A., forta bazo de praktika Esperantismo.

JOBO.

Cordoba, aprilo, 1927ª.

suscriptores... Ah, ¿sí? ¿Acaso después de la desaparición de la U. E. A. quedarán tantos ex socios que se interesen por la revista, la que, dicho sea de paso, en mi opinión privada, su lenguaje con frecuencia se aparta bastante de la forma pura y clásica zamenhofiana? ¡Si la organización desaparece, afuera también la revista! A pesar de su historia, reputación e importancia, su derecho a la vida cesará entonces, pues que ella jamás podrá sustituir a la organización y al anuario.

En resumen: el asunto de la U. E. A, es agudo y toca a todos los esperantistas. Acerca de él deberá ocuparse seriamente el Congreso de Danzig.

Esperemos que en el año jubilar 1927 no ocurra tamaño perjuicio, no se dé tal escándalo, cual sería la desaparición de la U. E. A., base firme del esperantismo práctico.

Fondiĝo de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropo-Unio en Wien

La 12ªⁿ de februaro okazis en Wien la fondanta kunveno de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropo-Unio. Direktoro Kronberger malfermis la kunvenon kaj salutis la ĉeestantojn. D-ro. Sos estis unuanime elektata kiel gvidanto de la Esperanto-Sekcio. D-ro. Sos dankis por la elekto, raportis pri la ĝisnuna propaganda agado de la esperantistoj por la Paneŭropa movado, kaj esperis, ke per la fondiĝo de la Esperanto-Sekcio ĉiuj esperantistoj sin unuigos por subtenado de la Paneŭropa movado. Post li referatis profesoro D-ro. Jokl pri la ŝtatokrea potenco de la lingvo kaj deduktis el tio la gravecon de la Esperanto-lingvo, kiu devenas el diversaj eŭropaj lingvoj, por la Paneŭropa movado.

Fundación de la Sección-Esperanto de la Unión Paneuropea en Viena

El 12 de febrero tuvo lugar en Viena la reunión para fundar la Sección-Esperanto de la Unión Paneuropea. El Director Kronberger abrió la sesión y saludó a los presentes. El Dr. Sos fué elegido por unanimidad para dirigir dicha Sección, dando gracias por la elección y explicando la labor de propaganda realizada hasta ahora por los esperantistas en pro del movimiento Paneuropeo, por lo que confiaba en que, al fundarse la Sección-Esperanto, todos los esperantistas se unirían para sostener el movimiento Paneuropeo. A continuación habló el profesor Dr. Jokl sobre la influencia del idioma en la creación de un Estado y dedujo de esto la importancia de la lengua Esperanto, derivada de las diversas lenguas europeas, en el movimiento Paneuropeo.

Direktoro Kronberger evoluis la organizacian planon de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropa Unio kaj voĉlegis la organizaciajn decidojn de la ĉefkomisio de la Paneŭropo-Kongreso, kiuj estu, same kiel por ĉiuj aliaj Paneŭropaj organizacioj, la fundamento ankaŭ de la Esperanto-Sekcio.

La kunveno decidis, interkomuniki sin kun la Esperanto-asocioj en Eŭropo kaj uzi Esperanton kiel korespondan lingvon.

La centro de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropo-Unio (E. S. P. U.) estas en Wien, I. Hofburg, kien oni sendu eliĝanoncojn kaj ĉiujn korespondaĵojn. Jara kotizo de membroj: aŭ. S 3.—(2 1/2 sv. fr.).

El Director Kronberger desarrolló el plan de organización de la Sección-Esperanto de la Unión Paneuropea y leyó los acuerdos orgánicos de la Comisión principal del Primer Congreso Paneuropeo, para que sirvan, lo mismo para todos los demás organismos Paneuropeos, que para fundamento de la Sección-Esperanto.

La asamblea acordó comunicarse con las asociaciones Esperantistas de Europa y emplear el Esperanto como lengua de correspondencia.

El centro de la Sección-Esperanto de la Unión Paneuropea (E. S. P. U.) reside en Viena, I. Hofburg, adonde deben dirigirse todos los anuncios y correspondencia. Cuota anual de miembro: au S 3. —(2 1/2 francos suizos) = unas tres pesetas.

Rimarkinda juĝo de «El Coronel Ignotus» pri Esperanto

Estas sendube, ke pri la konstanta disvastiĝo de nia helplingvo ne povas resti sen scio ankaŭ la verkistoj ĉiunaciaj. Jam plurfoje en modernaj romanoj kaj noveloj troviĝis pli-malpli ampleksaj aludoj al Esperanto; sed ilin nepre superas la paragrafoj skribitaj de «El Coronel Ignotus» (José de Elola) en sia interesa verko «El amor en el siglo cien», kiujn ni ĉi-sube reproduktas originale kaj Esperante. La neŝanceliĝebla fido al la venko de nia «sankta afero», la firma konvinko pri la nevariemeco de la fundamentaj principoj esperantaj en la trapaso de venontaj jarcentoj kaj generacioj kaj la klara ekkono pri la nepra utileco kaj bezonego de interlingvo, ĉio-ĉi manifestiĝanta en liaj vortoj, alproksimigas al niaj koroj la talentegan aŭtoron kiel *samideanon*, al kiu ni danke kaj ĝojplene premas la manon. Kiel aŭtoron

Notable juicio de «El Coronel Ignotus» sobre el Esperanto

Es indudable que, respecto a la constante difusión de nuestro idioma auxiliar, no pueden permanecer indiferentes los escritores de todas las naciones. Con frecuencia en los modernos escritos y novelas se encuentran alusiones más o menos amplias al Esperanto; pero seguramente las superan a todas los párrafos escritos por «El Coronel Ignotus» (José de Elola), en su interesante obra «El amor en el siglo cien», que a continuación reproducimos en su original y en Esperanto. La inquebrantable fe en el éxito de nuestra «santa causa», la firme convicción sobre la invariabilidad de los principios fundamentales del Esperanto en el transcurso de los futuros siglos y generaciones y el claro concepto sobre la indispensable utilidad y necesidad de una lengua internacional, todo esto que revelan sus palabras, aproxima

kaj verkiston ni konas kaj admiras lin jam delonge; ĉar, ĉu estas eble legi ekz., liajn interplanedajn vojaĝojn en kiuj li, ĉiam majstre, montras al ni la grandiozaĵojn de l' senlima universo, kaj ne eltiri el ili plenplenon da instruoj kaj sinceraj plezuroj?

Jen liaj vortoj:

«La amo en la centa jarcento»
(de «El Coronel Ignotus», José de Elola)

Inter la multaj aferoj mortintaj de l' jaro 2.000ª ĝis la 10.000ª troviĝas la nunaj lingvoj, studataj de instruitaj filologoj ne pli ol en la XXª jarcento oni studis la klasikajn grekan, hebrean kaj sanskritan. Tiuj eŭropaj lingvoj disiĝis en idaj idiomoj, sed kun aplikado regiona, treege limigita kaj nur dialekta. Ĉar tiel, kiel la homaro fine nur havis unu tutmondan ĉefurbon, *mundiopolis*, kapo nediskutita de la teraj nacioj ĉiuj federaciiĝintaj, sammaniere oni estis atinginta la interesegan progreson, havi nur unu solan lingvon de kleruloj por ĉiu oficiala ago, ĉiuj manifestoj sciencaj kaj literaturaj kaj por la necesaĵoj de la socia komunikado inter edukitaj personoj ĉiupopolaj kaj ĉiulatitudaj: *Esperanto*, la sama Esperanto farinta en la komenco de l' XXª jarcento siajn unuajn kaj penajn paŝojn; ĉar kiam la homoj konvinkiĝis, ke la naciaj fieroj estos ĉiam nesuperebla baro por la adopto kiel universala lingvo de iu el la tiam uzitaj de kiu ajn popolo, altrudiĝis tiu lingvo patrujorfa, kiel scienca lingvo unue, en la jarcento XXIIª, literatura poste en la jarcento XXVª, diplomata pli poste en la jarcento XXXII, komerca en la XLª kaj fine universala de la XLª al la Lª (Pri la sinsekvo oni povus diskuti. La tradukinto).

nuestros corazones al ilustre autor como *samideano*, a quien rendida y gozosamente estrechamos la mano. Como autor y escritor le conocemos y admiramos ya hace tiempo; porque, ¿es posible leer, por ejemplo, sus viajes interplanetarios, en los que él, siempre magistralmente, nos enseña las grandiosidades del universo infinito, y no sacar de ellos un cúmulo de conocimientos y de sinceros placeres?

He aquí sus palabras:

«El amor en el siglo cien»
(de «El Coronel Ignotus», José de Elola)

Entre las muchas cosas muertas desde el año 2.000 al 10.000 están los idiomas actuales, estudiados no más por eruditos filólogos, como en el siglo XX se estudiaban el griego clásico, el hebreo y el sánscrito. Aquellas lenguas europeas se multifurcaron en filiales idiomas, más con aplicaciones comarcanas sumamente restringidas y sólo dialectuales; pues así como la humanidad había llegado a tener una capital política del mundo entero, *mundiópolis*, cabeza indiscutida de las naciones de la tierra, todas confederadas, del mismo modo se había alcanzado el interesantísimo progreso de no tener sino un sólo idioma culto, para todo acto oficial, todas las manifestaciones científicas y literarias y para las necesidades de la comunicación social entre personas educadas en todos los pueblos y en todas las latitudes: el *Esperanto*, aquel mismo Esperanto que en los comienzos del siglo XX daba sus primeros y trabajosos pasos; pues al convencerse los hombres de que los orgullos nacionales serían siempre insuperable obstáculo a la adopción para idioma universal de ninguno de los usados por cualquier pueblo que fuere, se impuso aquel idioma huérfano de patria: como lengua científica primero en el siglo XXII; literaria después, en el XXV; diplomática más tarde, en el XXXII; comercial luego, en el XL, y hasta universal por último, desde el XL al L.

Krom la avantaĝo permesi al ĉiuj personoj de meza instruiteco ĉiulandaj interkompreniĝi, prezentis la strukturo kaj universala aplikado de Esperanto la econ de nevariemo; ĉar la jarcentoj ĝin riĉigis per la novaj vortoj postulitaj de la progresoj sociaj, sed modifis nek ĝian konstruon nek ortografion: prefero treege estiminda, ĉar kontraŭe al tio, kio okazis al hispano aŭ anglo aŭ franco el la xx^a^ jarcento, kiuj ne komprenis la verkojn en siaj lingvoj skribitajn ses aŭ sep jarcentojn antaŭe, la homoj centjarcentaj ne trovis malfacilaĵojn konsultante antikvajn librojn aŭ dokumentojn, tial ke ne ekzistis Esperanto antikva kaj Esperanto moderna, sed nur unu sola kaj unika Esperanto: la primitiva, riĉigita, sed ne modifita.

Tiu cirkonstanco estis feliĉega por la protagonistoj de ĉi-tiu historio, kiuj dank' al ĝi ne troviĝis tutege senkomunikaj kun siaj similuloj, kiam revenis iliaj spiritoj al la mortintaj, sed ne putriĝintaj korpoj, de kiuj ili forestis dum la daŭro de okdek jarcentoj; ĉar Inés kaj Juan estis en la unua etapo de sia vivo, pli ol distinguitaj esperantistoj, entuziasmaj apostoloj de la propagando poresperanta.

JOFEBO.

Sobre la ventaja de permitir a todas las personas de mediana educación de todos los países entenderse entre sí, ofreció la estructura y aplicación universal del Esperanto la de invariabilidad; pues los siglos lo enriquecieron con los vocablos nuevos exigidos por los progresos de las sociedades, pero sin modificar los antiguos, ni la construcción ni la ortografía: excelencia sumamente estimable, pues en oposición a lo que ocurría a un español, o a un inglés o a un francés del siglo XX, que no entendían las obras en sus idiomas escritas seis o siete siglos antes, los hombres del siglo C no tropezaron con dificultades al consultar añejos libros o documentos, por no haber Esperanto antiguo y Esperanto moderno, sino un sólo y único Esperanto: el primitivo, enriquecido, mas no modificado.

Tal circunstancia fué felicísima para los protagonistas de esta historia, que gracias a ella no se hallaron por completo incomunicados con sus semejantes al volver sus espíritus a los muertos, pero imputrefactos cuerpos, de donde estuvieron ausentes durante ochenta siglos; pues Inés y Juan habían sido en la primera etapa de sus vidas, más que esperantistas distinguidos, entusiastas apóstoles de la propaganda esperantista.

Grava sukceso ĉe fervojo

Sudslava Ministerio de Trafiko enkondukas Esperanton por surkriboj en internaciaj vagonoj

La Ĝenerala Sekretario de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Ĝenevo informis nin pri grava kaj decidiga sukceso de Esperanto en la kampo de fervojo.

Per dekreto de 21 marto 1927 al la akto G. D. nº 6071/927 sinjoro la minis-

Exito importante en los ferrocarriles

El Ministerio de Tráfico de Sudeslavia adopta el Esperanto para las inscripciones en los vagones internacionales

El Secretario General del Comité Central Internacional del Movimiento Esperantista en Ginebra, nos informa de un importante y decisivo éxito del Esperanto en el campo de los ferrocarriles.

Por decreto de 21 de marzo 1927 al acta G. D. núm. 6071/927, el señor Mi-

tro de l' trafiko de Sudslavio (subskr.: Svet. Milosavljeviĉ) bonvolis aprobi, ke en ĉiuj vagonoj de l' sudslava fervojaro, destinitaj por internacia trafiko, la helplingvo Esperanto estu aplikata sur oficialaj afiŝoj kaj avizoj.

Sekve de tio surskriboj en vagonoj, kiel «Ne kraĉu», «Ne klinu vin el la fenestro», «Alarmbremso», «Ne uzu dum halto en stacio» k. t. p., estonte estos akompanataj de la teksto en Esperanto.

Tiu larĝvida decido de l' sudslava trafika ministro estas grava kaj influhava al la sintenado de l' administracioj de fervojaro en aliaj landoj, kies imito de tiu ĉi kuraĝa ekzemplo estas atendata.

Tiu ĉi sukceso estas sekvo de iniciato, farita de l' prezidanto de I. C. K. D-ro. Privat, kaj posta kunagado kelkamonata de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj kaj I. C. K. (interkonsente kun Sudslava Ligo Esperantista). Oni ŝuldas aparte koran dankon al la fervora kunhelpo de S-ro. Puhalo, vicprezidanto de I. A. E. F. kaj al supera kontroloro S-ro. Stevan V. Stojniĉ, prezidanto de I. A. E. F., en Beograd, kiu en tute speciala kaj modela maniero helpis al la fina atingo de tiu-ĉi valora rezultato de komuna peticio, parto de pli ampleksa entreprenado.

Post ne longe la unuaj vagonoj kun Esperanto-surskriboj cirkulos en Sudslavio.

Ni petas niajn samideanojn vaste diskonigi tiun ĉi ĝojigan novaĵon en la gazetaro de sia lando kaj sendi gazet-eltranĉaĵojn (se eble, gluitajn sur kartojn) al Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, 12, Bd. du Théâtre, Genève (Svislando).

nistro de Tráfico de Sudeslavia (firmado: Svet. Milosavljeviĉ) se ha dignado aprobar que en todos los vagones de los ferrocarriles sudeslavos, destinados al tráfico internacional, la lengua auxiliar Esperanto sea empleada en los carteles y avisos oficiales.

En su consecuencia, las inscripciones en los vagones, tales como «No escupir», «No asomaros fuera de las ventanillas», «Timbre de alarma», «No usarlo durante las paradas en las estaciones», etcétera., en lo sucesivo irán acompañadas del texto en Esperanto.

La previsora resolución del ministro sudeslavo de tráfico es importante e influirá acerca de la actitud de las administraciones ferroviarias de otros países, cuya imitación de aquel valiente ejemplo es de esperar.

Este éxito se debe a la iniciativa del presidente de I. C. K., Dr. Privat, y a la posterior colaboración durante algunos meses de la Asociación Internacional de Ferroviarios Esperantistas e I. C. K. (de acuerdo con la Liga Esperantista Sudeslava). En particular se debe agradecer cariñosamente el fervoroso auxilio del Sr. Puhalo, vicepresidente de I. A. E. F. (que es la citada Asociación) y al inspector general Sr. Stevan V. Stojniĉ, presidente de la misma, en Belgrado, quien de un modo especial, digno de aplauso, contribuyó a la consecución definitiva de tan valioso resultado en la petición general, parte de una campaña más amplia.

Dentro de poco tiempo circularán en Sudeslavia los primeros vagones con letreros en Esperanto.

Rogamos a nuestros correligionarios propaguen extensamente esta satisfactoria noticia en la Prensa de su país y envíen un recorte del periódico (si es posible, pegado en tarjetas) al Comité Central Internacional del Movimiento Esperantista, 12, Bd. du Théâtre, Ginebra (Suiza).

Esperantista Akademio

ELEKTOJ

EN LA LINGVAN KOMITATON

Voĉdonintoj: 107.

Estas elektitaj:

Nova membro: S-ro. Cogen (101 voĉ).

Elirintaj membroj:

S-roj.	Lundgren..........	99 voĉ.
»	Krestanoff..........	98 —
»	Grau Casas (Josep).....	97 —
»	Török............	95 —
F-ino.	Pulvers............	93 —
S-to.	Blok..............	91 —

La Sekretario, *R. de Lajarte.*

La Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, *Th. Cart.*

Academia Esperantista

ELECCIONES

PARA EL COMITÉ DE LA LENGUA

Votantes: 107.

Han sido elegidos:

Nuevo miembro: Sr. Cogen (101 votos).

Miembros salientes:

Sres.	Lundgren..........	99 votos.
»	Krestanoff..........	98 —
»	Grau Casas.........	97 —
»	Török............	95 —
Srta.	Pulvers............	93 —
Sr.	Blok..............	91 —

El Secretario, *R. de Lajarte.*

El Presidente del Comité de la Lengua y de su Academia, *Th. Cart.*

SCIIGOJ

Iberia Esperanto Servo.—Nia samideano S-ro. Ferdinando Montserrat, Vicdelegito de U. E. A., Reprezentanto de *Heroldo de Esperanto* kaj aliaj gazetoj kaj eldonejoj, jus fondis en Barcelono, strato Villarroel, 107, 2.°, 2.ª, centron por abonoj kaj vendado de ĉiuspecaj gazetoj, libroj, steloj kaj propagandaĵoj esperantaj, sub la titolo de «Iberia Esperanto Servo», kiu multe faciligos ilian akiron al la esperantistoj ĉiulandaj, precipe al tiuj de Hispanujo kaj Portugalujo.

Li insiste petas al ĉiu libro-eldonisto aŭ aŭtoro sendi al li prunte unu ekzempleron de liaj propraj eldonaĵoj kune kun prezaro kaj kondiĉoj por vendado pogrande aŭ pomalgrande. Okaze li devas ricevi la mendojn de la interesuloj, kaj li petos la varojn al la aŭtoroj aŭ eldonistoj, kiuj vendos pere de li. Sendu tuj al li tiujn specimenojn, ĉar li intencas

NOTICIAS

